

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas Claude Gacond, prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando, kiu intervjuas sinjoron Marcel Erbetta, direktoro de la tutmondaj interlernejaj rondoj *Grajnoj en Vento*.

Okaze de la kunveno de la svisa esperantistaro en Berno, mi admiras plian fojon la fruktojn de la laboro de instruisto el la dulingva svisa urbo Biel (germana nomo) aŭ Bienne (franca nomo). Mi havas antaŭ la okuloj belajn kaj de plej diversaj klasoj verkitajn kajerojn. Ni trafolumu unu el ili por vi.

Marcel Erbetta.- 38 japanaj geknaboj sin prezentas pere de klasfoto. Ili tradukis du japanajn kantojn, faris belajn kret-desegnaĵojn kaj priskribas sian urbkvartalon en Kioto.

Gacond.- Post Japanio, ni iru al Anglujo !

Erbetta.- Jes ! Vi vidas tekstojn kaj desegnaĵojn el Stoke on Trent. Jen poste kontribuaĵo el Erevan (Soveta Armenio). Tuj poste vi trovas klason el Hillsborough (Usono). Ambaŭ klasoj rakontas pri la aktiveco de la esperanto-klubo en la lernejo.

Gacond.- Bela simbolo, se infanoj el ambaŭ ideologiaj mondpartoj rakontas similaĵojn, jen simbolo, ke foje eble malaperos la malamoj inter la homoj dank'al konvena edukado.

Erbetta.- Jen multaj tekstoj de 11-jaraj geknaboj el Zagreb (Jugoslavio).

Gacond.- Tiuj infanoj ankaŭ tradukis kantojn.

Erbetta.- La samon ankaŭ faris klaso el Stockholm (Svedujo).

Gacond.- Viaj gelernantoj do povas lerni kantojn el ĉiuj landoj. Ili devas esti fieraj !

Erbetta.- Jen la kontribuo el miaj gelernantoj : tekstoj kaj desegnaĵoj rakontas klasan ekskurson, dum kiu ni fakte kantis kantojn el diversaj landoj.

Gacond.- Jam de kiom da jaroj funkcias tiuj interŝanĝoj kaj kiom da klasoj ili grupigas ?

Erbetta.- Mi komencis per la sendo de unua kajero en marto 1956. Hodiaŭ post 7 jaroj *Grajnoj en Vento* kunigas 70 klasojn el 16 landoj. Ĉiuj kontinentoj, krom Afriko, estas reprezentataj.

Gacond.- Se ni nombras meznombro de po 25 gelernantoj por klaso, tio donas 1750 gelernantojn. Kaj ĉiujare, pro la klasŝanĝoj, vi tuŝas novajn gelernantojn. Vi vere semas grajnoj aŭ semojn en la venton! Mi esperas, ke tiuj semoj bone ĝermos. Kiel funkcias tiuj interŝanĝoj ?

Erbetta.- Tiuj klasoj estas grupigitaj en rondoj, kies sidejoj troviĝas ĉe kunlaborantaj edukistoj. Tiuj sidejoj troviĝas en Anglujo, Francujo, Jugoslavio, Svislando kaj Urugvajo. Rondo estas grupo de deko da klasoj, kiuj 3-foje en la jaro (1-an de marto, 1-an de junio kaj 1-an de novembro) eldonas lerneajn kajerojn. La klasoj multobligas siajn kontribuaĵojn kaj eldonas 20 kajerojn. Ĉiu klaso ricevas unu kajeron, la centro de Grajnoj en Vento kaj la Esperanto-Muzeo en Vieno ankaŭ.

Gacond.- Kiaj verkoj aperas en tiuj kajeroj!

Erbetta: Estas tekstoj pri la reala vivo en la hejmo, lernejo, vilaĝo, urbo, lando, tekstoj pri kutimoj, ludoj, festoj, ĝojoj kaj malĝojoj, tekstoj pri homoj kiuj honorigis la landon, desegnaĵoj, bildoj, fotoj, prospektoj, ilustritaj poŝt-kartoj, mapoj, sekigitaj floroj, ktp... Politik-tendencaj artikoloj estas nepre malpermesataj. Nia devizo estas: Toleremo por la najbaro, kiu ne havas samajn konceptojn.

Gacond.- Vi estas superpolitika organizo.

Erbetta.- Jes, kaj ankaŭ superrasa kaj superreligia.

Gacond.- Saĝa decido !

Erbetta.- Ekzemple ni ne volas, ke pere de niaj kajeroj oni devigu infanojn verki ŝovinistajn tekstojn kontraŭ alilandanoj.

Gacond.- Ĉu tio jam okazis ?

Erbetta.- Tre malofte ! Ni tiam skribas al la klasestro por memori al li la neceson esti tolerema. Estas edukado al toleremo.

Gacond.- Ĉu nur klasoj partoprenas tiun laboron ?

Erbetta.- Ankaŭ kluboj kunlaboras. Kaj la rondoj kunigas estontajn instruistojn kun centro en Jugoslavio, kaj sciencistojn kun centro en Urugvajo.

Gacond.- Do via labortekniko ne nur interesas edukistojn, sed ankaŭ fakulojn, kiuj tiel interŝanĝas siajn vidpunktojn.

Erbetta.- Mi estas kontenta pri tiu disvastiĝo.

Gacond. Mi komprenas, kaj mi gratulas vin pro via iniciato. Mi esperas, ke iom post iom vian laboron subtenos ne nur la esperantistaro, sed ankaŭ Unesko, kiu celas fakte tion, kion vi praktikas. Eble la Internacia Konferenco de la Lernejoj de la venonta somero en Beogrado, kie vi devos raporti, diskonigos vian laboron.

Erbetta.- Mi esperas.

Gacond.- Dum alia elsendo mi legos tekstojn eltiritaj el viaj internaciaj klas-kajeroj. Se aŭskultantoj deziras ricevi pliajn informojn, ili skribu al Radio-Svislando.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Claude Gacond intervjuis la instruiston Marcel Erbetta, la direktoro de la tutmondaj interlernejaj rondoj *Graĵnoj en Vento*.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-